

# LA SKOLTA MONDO

NE ISSN 0037-6558

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTO LIGO

NUMERO 5 VOLUMO 7 UNUA JARKVARONO 1989

# S.E.L. SALUTAS

Post 20 jaroj da laboro en la Monda Skolta **Movado**, lasis sian postenon la Ĝenerala Sekretario, S-ro Lazlo Nagy. La pasintan lan. de Novembro de 1988, oni elektis kiel nova Ĝenerala Sekretario, la svizon Jacques Moreillon.

Li aĝas 48 jarojn kaj nuntempe estas la Ĝenerala Direktoro de la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco ĉe Ĝenevo. Pro tio oni konsideras, ke lia sperto jam akirita en tiu fama kaj tutmonda organizo, certe helpos al la disvolvo de nia Movado.

Li reprezentis la Ruĝan Krucon en ĉ. 200 misioj en pli ol 70 landoj, inter kiuj troviĝas Vietnamo, Sirio, Israelo.

S-ro Moreillon estas Doktoro pri Politikaj Sciencoj, kaj estis Direktoro pri Doktrino kaj Juro; Direktoro por la Ĝeneralaj Aferoj kaj poste Ĝenerala Direktoro de la Ruĝa Krucon kiel jam dirite.

Ene de la Skolta Movado, li laboras ĉe la skolta grupo el Vieuw-Mazel, ĉe Vevey(Svizlando). Post sia elekto, li deklaris ke:" Skoltismo ludas gravan rolon en mia vivo... ĝi estis kaj estas unu el la elementoj esencaj por mia edukado kaj ja estas la dorsa kolono de mia ekzistado".

Li ankaŭ diris: "mia decido partopreni en skoltismo ne signifas ke mi forlasos la idealojn de la Ruĝa Kruco. Estas pro la neceso profunda konsekri novan fazon de mia vivo profesia por idealo kaj por organizaĵo, kiuj konstruas nian estontecon pere de la edukado al la hodiaŭa junularo. Mi devas helpi, rekte aŭ nerekte, plibonigi la karakteron kaj la personan disvolviĝon de la morgaŭaj adoltoj, ĉe la tuta mondo".

# La lasta raporto de Lazlo Nagy

**Jen estas kelkaj partoj de la lasta raporto de LAZLO NAGY kiel Ĝenerala Sekretario de la Skolta Movado, post 20 jaroj da laboro:**

"Permesu min doni simplan kaj etan raporton al vi pri la nuna stato de la Movado.
Ni komencos ĉe Eùropo. Tio ĉi ne prenos tro da tempo ĉar vi bone konas la staton en viaj landoj. Sed tio ne vere signifas nepre ĝin vere koni. Rilate al la nombro en Eùropo mi devas diri ke estas bona. Kelkaj landoj atingas 10% el la junularo, kion oni povas konsideri kontentiga. Sed nur Unuiĝinta Regnaro havas pli ol tiu 10%, en la aliaj landoj ankoraù ne plenumas tiun ciferon. Estus facile atingi ĉ. 3 milionojn se la aliaj landoj atingus tian nombron.
Oni plibonigis la programojn kaj la demarŝo el la rimedoj. La aĝo de la membroj fariĝas pli malgranda nuntempe, sed ne tiel rapide.
Finace parolante, la eùropa movado marŝas bone, kelkaj problemoj estas sed devigas nur la neefikan kaj nekapablan funkciigon pli ol manko da rimedoj.
La Eùropa Skolta Regiono troviĝas ĉe nekredebla favora posicio pro la heredaĵo MacIntosch. Sed, atentu! Ne trouzu ĝin.
Ĉe la Amerika Skolta Regiono: La socia etoso, kaj la ekonomia situacio ŝanĝas terure inter la nordo kaj la sudo. Du naciaj asocioj sukcesegas: Boy Scouts of America kaj Boy Scouts of Canada. Male estas en la Centra kaj Suda Amerikoj. Tie estas nur 300 mil skoltoj en tre juna loĝantaro, tio tute ne estas bona. La kialoj estas la manko da rimedoj, malriĉeco, neefikeco, malkompetenteco, korupcio kaj malbona politika direktado. Skoltismo ankoraù ŝajnas esti importita produktaĵo, kaj restas sen socia adaptiĝo. Sed, malgraù tio, estas interesa renoviĝo kaj vigleco. En multaj landoj jam komencas ŝanĝi la programojn kaj pliboniĝi la kvaliton de la estrularo. Oni esperas ke la plej riĉaj fratoj de la Nordo, helpu kaj pligrandigu ilian kunlaboradon por la centraj kaj sudaj fratoj.
Nun mi parolos pri la Skolta Regiono Araba. Tiu ĉi regiono progresas spite al la politikaj malfacilaĵoj. Ĝi havas kiel ĉefa karakterizaĵo tre gravan unuecon kulturan kaj religian, kaj ĉefe estas la araba lingvo. La skolta aktiveco, male al kio okazas en Latinameriko, plene spegulas la regionajn tradiciojn. Plej parte de la loĝantaron havas favoran impreson de la movado. Tie ekzistas jam 300 mil skoltoj kaj ĉiujare kreskas.
Pri la Afrika Regiono oni povas diri ke ĝi malrapide sed konstante kreskas. Estas pluraj malfacilaĵoj kiel malbonaj komunikad-eblecoj kaj manko da popolnombrado. Eble la movado nombras ĉ. 700 mil partoprenantojn. Ankoraù en Afriko ne estas veraj ŝtatoj, kaj eĉ malpli da nacioj. Do, la skoltismo ŝajnas iom stragna por eksterlandanoj, ĝi estas eksterordinara kaj komplika. La afrika movado estas tio, kio estas originala kaj ne perfidas ĝian afrikan devenon.
Nun ni troviĝas antaù la plej vasta skolta regiono: Azio-Pacifika. Estas ja malfacile paroli pri unuiĝeco tie ĉi. La regiono havas multajn kaj malsamajn popolojn, kiuj apartenas al malsamaj rasoj, lingvoj kaj religioj. Sed tio ĉi ne malpermesas la antaùeniradon, ĉar ĝi estas dinamika. Vidu nur ke malgrandaj landoj kiel Koreio kaj Hongkongo havas kune pli da skoltoj ol la Sudamerika kontinento!. Japanujo havas pli ol la tuta araba regiono. Kaj Filipinoj kaj Indonezio havas pli da skoltoj ol la tuta eùropa regiono. La ekonomia situacio certe helpas, precipe en la plej orienta zono.
Tie estas pli ol 7 milionoj da skoltoj, sed la certan nombron neniu scias. Kvankam ili havas problemojn, ili progresas. Jam ne plu prenas la eksterlandajn modelojn kaj posedas verajn skoltajn programojn por siaj propraj landoj. Ankoraù estas malfacilaĵoj kun la politikaj aùtoritatoj en kelkaj landoj malebligas la disvolvon de la movado.
Ni restas feliĉaj ĉar la bonaj kaj favoraj elementoj abundas spite ĉion. (Mallongigita de la Redaktoro, el Esperienze e Progetti 70).





# VOLAS KORESPONDI

MAREK NIEWIADOMSKI; ul. Wrocławska 18, PL-58 514 Jelenia Góra, Pollando, deziras korespondi tutmonde kun skoltoj.

WITOLD DOBRZYNSKI; Waryńskiego 16/53, PL-85 320 Bydgoszcz, Pollando. 23jara skolto, deziras korespondi pri skoltismo, junularo k.a.


CHRISTOPHER ARCHER; 8 Graham Terrace, Pittington, Durham, Britio Dh6 1AU. 25 jara skoltestro, deziras interŝanĝi skoltajn insignojn kaj poŝtkartojn pri skoltismo tutmonde.

El Pen-Pal Programo de la Skolta Movado oni petis nin meti la jenajn adresojn:
HUGO JOSE CARDOSO; Rua Vilarinha 520-2º, 4100 Porto, Portugalio. 14jara skolto deziras korespondi tutmonde en la angla kaj portugala.


VERED LICHTER; 5 Moyal St. Ramot Zahala, 69 351 Tel-Aviv, Israelo. 17jara, deziras korespondi angle tutmonde.

TELLE PELTERS; Wiesentr. 46, D-4054 Nettetal 1, F.R. Germanio; sen aĝindiko, deziras korespondi angle kaj france.

INTERŜANĜO: -Troop 98, P.O. Box 318, Owensboro, KY 42302, Usono. Korespondado en la angla.
-Alcatéia Paraguaia, Srta. Graciela Franco A. Agrupación Scout 89- Salto del Guaira, Caixa Postal 365, Guaira- Paraná, BR-85980, Brasil.




Inter la 2ªa. kaj 10ªn de Januaro 1989, okazis la 4ª Renkontiĝo de Roveroj el Novzelando.
La sidejo estis la Wai-
ra Scout Campsite, prok-
sime de Dunedin.
La junuloj povis partopreni diversajn aktivecoj kiel kuirado, ekskursoj, dancado, supervivado, boatetado, k.t.p.
Partoprenis ĉ. 500 hom




En la 9ª Regiono de Ĉilio, Sudameriko, ĉ. 700 Kilometrojn sude de Santiago, la ĉefurbo, okazis la 6ª Tutamerika Jamboreo kiun partoprenis ĉ. 12 900 gejunuloj el 23 landoj, krom partoprenantoj el Hispanio, Belgio, Francio kaj Svedio.
La sidejo konsistis el 120hektarojn, tre bela, kaj lokita je la ĉirkaŭaĵo de la Lako kaj Vulkano Villarrica.
Kelkaj delegacioj vojaĝis buse, aliaj trajne kaj buse. La foraj delegacioj atingis la landon aviandile.
La vojaĝo de Santiago al la kampejo daŭris ĉ. 16 horojn, sed la ĝojeco kaj vigleco de la partoprenantoj faris ĝin pli agrabla. La brazilanoj atingis buse, sed ne ĉiuj atingis samtempe, do pro tio ili havis problemojn por prepari manĝaĵojn. Parto de la argentina delegacio alvenis post la komenco pro doganaj malfacilaĵoj.
Oni organizis la kampejon tiel ke ekzistus 12 triboj kaj 6 vilaĝoj. Ĉiu tribo havis la nomon de iu ĉefa popolo nativa prakolomba (Dakotoj, Aztekoj, Majoj, Kariboj, Ĉibĉoj Inkaoj, Tupioj, Guaranioj, Kalĉakioj, Ĉaruoj, Kojoj kaj Mapuĉoj). Ĉiu vilaĝo konsistis el du triboj, kaj estis la administra ero: ĉiu aktiveco estis organizita laŭ vilaĝo. Unu aktiveco daŭris la tutan tagon: Vulkana Grimpado, Laka Ludado, Vivprojekto, Turniroj, Metiejoj kaj Triba Festado. Ĉiutage okazis la Interŝanĝa Vespero ĉe Tiahuantiansuyo Placo( tio signifas, ejo kie kuniĝas la kvar partoj de la mondo). Ni estis invitita partopreni en la Metieja

Programo. Estas la unua fojo ke Esperanto havas ian rolon en iu grava even- skol to ta en Su Sudame- riko.


# JAMBORADA
## Jamboree Austral 89



La Inaŭgura do okazis sub forta pluvo, sed ni ĉiuj restis ĝojaj kaj kontentaj. Oni kantis, dancis kaj aŭskultis la paroladojn de la aŭtoritatuloj. Jacques Moreillon sendis salutvortojn en la hispana lingvo. Post la inaŭgurado, ni ne plu vidis la sunon ĝis 5 tagoj poste. Pluvis, pluvetis, pluvegis dum tiuj kvin tagoj. Sed malgraŭ tio, ĉio okazis laŭ planite; kelkaj ŝanĝoj rilate al la ejoj, sed bone funkcis ĉion.

La manĝaĵojn devis prizorgi ĉiu patrolo mem, kaj por disdoni la varojn estis merkatoj en ĉiu vilaĝo. Ankaŭ estis tie hospitalo kaj akvejoj. La duŝoj estis komunaj: unu por knaboj, alia por knabinoj. Por prizorgi la sekurecon kaj ĉio kio povus okazi ene kaj ekster la kampejo, estis multegon da geroveroj.

Krom la jam menciitaj aktivecoj, ankaŭ okazis koncertoj de la Armea Orkestro, kaj prezentado de la Nacia Ĉilia Folklora Baledo, kaj partoprenis du el la plej elstaraj ensembloj pri moderna mu-ziko de Ĉilio. La Aviado montris kelkaj aviandilojn pri aerobatiko.



Pri mia Esperanta metiejo, mi povas rakonti multegon. Preskaŭ neniu ekscii pri la ekzistado de Esperanto. Eĉ kelkaj junuloj pensis, ke ĝi temis pri speciala kuiraĵo farita el marbestoj!

Ĉiutage mi devis klarigi al la partoprenantoj kio



Esperanto estas, por kio ĝi servas, k.t.p. La tuta metiejo daŭris 3 horojn, kaj ĝi okazis dufojoj tage, kun du malsamaj grupoj el 24-36 gejunuloj. Pere de dialogoj, kanzonoj kaj teatraĵoj oni enkondukis ilin en la lernado de la lingvo. Por montri kie kaj kiel oni uzadas Esperanton, mi kunportis revuojn kaj bultenojn tutmondajn, poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn. Oni aŭskultis radiodisaŭdigojn kaj paroladon inter radioamatoroj kaj mi montris konfirmokartojn el diversaj mondpartoj kiujn mi kontaktis Esperante.

Propagandilojn oni pretigis helpe al la financa subteno de la Geskolta Ĉilia Asocio, la Amerika Skolta Konferenco kaj kompreneble de S.E.L. Ĝi estis trilingva.

Oni disdonis la libreton "Vastaj Horizontoj" al la membroj de la Konferenco, kunvenintaj ĉe la Ĵamboreo. Oni intervjuis kelkaj da ili pri la sinteno al Esperanto, kaj ĝenerale ĝi estas tre favora. Propagandi estas nia venonta celo.

Finfine ĉirkaŭ 57 gejunuloj interesiĝis pri la lingvo kaj kelkaj jam lernas la lingvon. Nin favoris ege, la vizito de franca junulo Philippe Chavignon, kiu hazarde vojaĝis tra Ĉilio kaj ĉeestis la Ĵamboreon dum 3 aŭ 4 horoj, kaŭzis tio ĉi kaoson ĉar neniu sen rajtigilo povis trapasi la kampejon kaj li povis liberi ĉion viziti.

Certe estas multe pli rakontebla, sed la spaco ne sufiĉas kaj la memorindaĵoj estas troaj. Do, mi devas diri, ke Esperanto havas novajn interesatojn en Bolivio, Urugvajo kaj Paragvajo. Brazilo, Argentino kaj Ĉilio daŭre kreskas sed oni multe devos labori. En aliaj landoj, ankoraŭ estas tro malfacila afero, sed iam... iam ni sukcesos tie ankaŭ.

# ¡América, por la paz!

## SKOLTISMO, EDUKA JUNULARA ORGANIZAĴO (2)



Estante skoltado eduka komunumo, ĝi tamen ne donas atestilon nek akademiajn titolojn por la junularo partoprenanta en ĝi. B.P. iam diris "Mi ne komprenas pri edukado akademian titolon aŭ ion similan, sed la edukado de la menso kaj la animo". Por nia Fondinto, eduki la junularon ne konsistas "en plenigi sian cerbon", sed stimuli ĝin de sian propran mondon por la ekzercado responda pri sia libereco.

Tial, la skolta edukado estas nuntempe la necesa komplemento de la lerneja kaj familia edukado por milionoj da geknaboj tra la mondo, ĉar metas ilin en la eblenoj da geknaboj... 

Tial, la skolta edukado estas nuntempe la necesa komplemento de la lerneja kaj familia edukado por milionoj da geknaboj tra la mondo, ĉar metas ilin en la ebleco sin entuziasmigi pri sia propra edukado en agrabla atmosfero de libereco. Oni devas kompreni, ke en la skoltado, la junul(in)o ne estas sako plenigonta sed fajro ekbruligonta. Ili estas pura rivereto, kiu post kelke da tempo, fariĝos rivero tra kie la junul(in)o devas fari sian trairadon homan kaj eternan.

Nia junularo lernas en la skolta edukado kiel disvolvi aktive kaj libere siajn fizikajn, intelektajn kaj moralajn kvalitojn, pere de korekta konjugacio de aktiva pedagogio, kun kontakto natura, vivanta komunume kaj en respondeca klimato. Ĉio ĉi ene de GRANDA EDUKA LUDO, ĉar tiel ni povas difini skoltismon, kiun ŝtelas ĉiajn energiojn de la junul(in)o, stimulas ilin en la laboro de sia propra edukado, malfermas la veran amikecon kaj fratecon, en kiujn la junul(in)o sin ĝojigas kaj faras feliĉaj la ceterulojn, celo de ĉiu bona edukado.

Tio ĉi donas specialan "STILO"-n al la junularo kiu partoprenas en nia movado, kaj kiu oni ne perdos dum la tuta vivo.

Tial, estas tute vera tiun moton de la malnovaj geskoltoj; ĝi tekstas:

" IAM SKOLTO, ĈIAM SKOLTO "

Kádima, kádima, kadimarusa• kadimarusa, kadimarusa,• kádima, kádima, kadimarusa• kadimarusa - sá. • La, la, la...




## ETAJ NOTOJ

En Finnlando okazos Esperanto-kurso por skoltoj
5an ĝis la 11an de junio, 1989. Organizas ĝin Skolta
ranto-Ligo kaj instruos la finn-skoltino Anna Ritamäk
polo Georgo Hanszlik.

La kurso havos tendaran karakteron. Estos spura
ludoj k.t.p. krom la Esperanto- Studprogramo. Sed en
programeroj, Esperanto ludos gravan rolon tiel, ke la
toprenontoj lernos la lingvon en amuza maniero.

Eksterlandanoj estas kore bonvenaj. Partopreno
lilingvanoj vigligos kaj internaciigos la kurson. Kon
Skolta Esperanto-Kurso, Anna Ritamäki, Källkullen, SF
Kimito, Finnlando.

Informoj pri la kurso kaj pri Esperanto jam ap
en kelkaj skoltaj gazetoj. La kurs-libro estos la el
de SEL "Ĵamborea Lingvo".



Post la apero en la lasta numero de LSM, de artikoleto pri radioamatorismo, venis al mi leterojn en kiuj oni sciigis min,kelkajn gravajn novaĵojn. Almenaŭ du legantoj, krom la redaktoro,estas radioamatoroj: Gérard Coulon el Francio(FD1NGH), kaj nia Nacia Reprezentanto en Hispanio, Luis Gilpérez Fraile (EA7CAC). Ambaŭ aktivas inter la radioamatoraj esperantaj stacioj. Do, kredeble estas pliaj LSM-legantoj kiuj interesiĝos pri la temo. Turnu sin al la redaktoro.

Gérard proponis al la Monda Oficejo la enkondukon de Esperanto por la ĉi-jara Ĵamboreo-per-la-aero. La respondo estis tre ĝentila kaj ne kontraŭstaras la proponon, sed la vojo estas turni sin al la Nacia Prizorganto de la JOTA; do ni jam scias tion nun. Do, gefratoj skolt(in)aj, preparu la grundon por la semado!!!!

*

La venontaj Tutamerikaj Ĵamboreoj okazos en: 7ª Kolombio, kaj la 8ª en Brazilo. Problemo estas ĉu vere okazos en Kolombio dum 1990 pro la politika situacio tie, kaj pro la kvazaŭ civila-milito. Kaj en Brazilo okazos en la jaro 1992, ĉe la Historia Parko Marŝalo Luis Osório, Ŝtato Rio Grande do Sul.


La saman jaron 1992, okazos ankaŭ la Du-kontinenta Ĵamboreo Ameriko-Eŭropo, okaze de la 500ª Datreveno pri malkovrado de la Nova Kontinento far de la hispanoj. Ĝi estos en Kanariaj Insuloj, Hispanio.

*

Koreio jam prizorgas la Mondan Ĵamboreon de 1991, ĉe la Nacia Parko Soraksan, 210 kilometrojn oriente de Seulo. La motto estas: "MULTAJ NACIOJ, UNU SOLA MONDO".

Nederlando organizos la 18ªn Mondan Ĵamboreon en 1995 kaj Brazilo tiun, kiun okazos en 1999. Sed ĉi lasta ankoraŭ ne estas decidita ĉar ankaŭ konkursas en tiu afero la lando de tiu ĉi redaktoro, Ĉilio.




# PAROLAS: LA LEGANTO

**Alvenis al mi multaj leteroj, kaj do mi elektis tiujn kiujn mi trovis interesajn.**

**Estimataj SEL-anoj:**
**Vi ĉiuj scias, ke niaj skoltfratoj Ko Hammer kaj Hans Amund "emeritiĝis" pasintjare kiel respektive Generala Sekretario kaj Redaktoro de LSM. Ili komecis tian laboron en 1964.**
**Mi ne estas tre aktiva membro de SEL, sed legis antikvajn numerojn pri la Historio de SEL, kaj mi scias iom pri grandegaj laboroj de ili favore al nia Ligo. Skribi pri ĉio oni certe bezonos centojn da paĝoj : sukcesoj, venkoj, agrablaĵoj, esperoj kaj ankau la maloj de tio... sed ĉiam laboro kaj sindonemo.**
**Ni skoltoj, devas esti dankemaj homoj, ĉar dankemo estas "virto de bonnaskitoj". Ni ŝuldas troe al Hans kaj al Ko, por nur diri "adiau"-on. Do, mi petas al la Centra Komitato de SEL kaj al vi ĉiuj, ke ni nomumu ilin kiel HONORAJ MEMBROJ de la Ligo. Tiel, ili restos por ĉiam apud ni, kaj ili certe scios ke ili restos por ĉiam en nia koro. Alian honoron ili meritus certe, sed ne eblas al ni krei la platenan lupon. Dankon, Ko kaj Hans.**

**Luis Gilpérez Fraile**
**Nacia Reprezentanto**
**Hispanio**

(Kion vi opinias?: Noto de la Redaktoro)

**Legantino diris ke nia bulteno devus esti pli aktuala rilate al la skolta movado. Jes+ Si pravas, sed ricevi informojn el la tuta mondo ne estas facila laboro. Do, ĉu iu sin prezentos kiel raportist(in)on au korespondant(in)on por havigi al ni multe pli da novaĵoj ol da malnovaĵoj? Mi atendas respondojn**



Leterojn el du diversaj landoj mi ricevis kun jena demando: Kial vi sendas al mi pliajn numerojn de LSM ? Mi nur bezonas unun.
Respondo: La kialo estas ke oni sendas ilin por propagandi kaj la Ligon kaj la lingvon. Se vi ne deziras havi ilin en via bretaro, sendu al iu skolta au junulara organizo kun klarigo pri kio temas. Tiel ni eble havos pliajn interesatojn, ĉu ne?

El la Redaktoro
Mi tre dankas la revuojn kaj bultenojn senditaj el diversaj landoj. Se ankorau ne aperas artikolojn el ili estas pro la tradukado kaj mallongigado, kiujn devige mi devas fari pro manko da spaco. Daŭrigu sendante ilin al mi, ĉar tiel mi povas elpreni tion, kion ŝajnas interesa kaj amuza, krom scii kion okazas alilande. Dankegon!

Se vi deziras meti korespondpeton en LSM; bonvolu klarigi la aĝon, sekson, kaj la plenan adreson sen mallongigon escepte de la kutimaj. Kaj faru tion preslitere, male oni ne povos plenumi ĝin.

Same okazas kun la novaj interesatoj pri LSM, au kiam vi ŝanĝu adresojn. Skribu klare vian novan adreson kaj nomo, se eblas aldonu la malnovan slipon por ŝanĝi ĝin en niajn rekordoj. Se vi ne faras tion, vi perdos LSM, kaj la Ligo monon, kiun povas esti pli bone uzata. Cu bone?

Pere de tiu ĉi numero, komencas mian duan jaron kiel Redaktoro de LSM. Espereble mi ne tro ĝenis vin, kaj mi daure atendas viajn komentojn kaj kritikojn. Ili vere helpas al mi fari pli bonan laboron. Mi pardonpetas pro la gramatikaj eraroj kaj la tro malbonforma marĝeno. Gis!

**LA SKOLTA MONDO**, Nº1<1989>, 7ª Volumo. Presita en Ĉilio. Prezidanto: FRANCO ABRIANI, Via Falconetto 24, I-37131 Verona, Italio. Ĝen. Sekretario: DAVID H. WITHEY, 21 Brookfield Ave., Waterloo, Liverpool L22 3YE, Britio. Kasisto: LAWRENCE MEE, 19 Cranbury Rd., Eastleigh, Hants., SO5 5HB Britio. Redaktoroj: MICHEL BASSO, 153 Rue Clémenceau, Wintzenheim, F-68000 Colmar, Francio; HECTOR R. CAMPOS GREZ, Casilla 231, Curicó, Séptima Región, Ĉilio/Chile. (890329)